

Mèng Hàorán,  
Mountain glow

*tradukita de N. N. 77*

Mountain glow sudden west set  
Pond moon gradually east up  
Loose hair enjoy evening cool  
Open window lie idle spacious  
Lotus wind carry scent air  
Banboo dew drip clear sound  
Wish fetch sound qin pluck  
Regret not perceive sound appreciate  
Feel this think of old friend  
Whole night labour dream think

*Traduko de la ĉina poemo “Shān guāng” de MÈNG HAORÁN (\*689 – †740) en la Anglan de N. N. 77.*

*Arg-995-2009 (2014-04-20 00:34:46)*

*Tiu ĉi laŭvorta angligo troviĝas en <http://www.chinese-poems.com/m6.html>.*

Mèng Hàorán,  
Somera vespero

*tradukita de Manfred Retzlaff*

*Somertage en Nanting mi sopiras al Xinda*

De l' montoj ora lumo nun  
foriĝas en vespera pac'.  
Ekestas trema bild' de l' lun'  
sur de l' lageto la surfac'.  
Kun loza kap-hararo mi  
sur la teraso kuŝas nun,  
kvietas mia vivo, ĝi  
sin donas al la lum' de l' lun'.  
Flariĝas melilot-odor',  
ĝi lante supreniĝas al  
la dom' dum la vespera hor',  
susuras jen ros-guto-fal'.

*Traduko de la ĉina poemo “Shān guāng” de MÈNG HAORÁN (\*689 – †740) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).*

*Arg-995-2008 (2014-04-21 20:09:05)*

*Mi, Manfred Retzlaff, esperantigis la poemon laŭ la germanigo, kiun verkis la germana poeto Manfred Hausmann. Pri tiu vidu la retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Manfred\\_Hausmann](http://de.wikipedia.org/wiki/Manfred_Hausmann). La subtitolo “Somertage en Nanting mi sopiras al Xinda” signifas, ke la poeto, sidante en la suda pavilo “Nanting”, sopiras je sia amiko Xinda.*